

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.



DOMINIKO SERDÁ SIMÓ

DOMINIKO SERDÁ SIMÓ

LA 27^{an} Junion mortis en Sabadell je la 27^a ĵaraĝo nia amiko kara, la direktoro de K. E. Sro. Dominiko Serdá, unu el la plej entuziasmaj esperantistoj de nia lando.

Kiam por ni devus esti motivo de ĝojo la redaktado de ĉi tiu numero, kiam niajn orelojn ankoraŭ frapas la festbruo okaze la sukceso de nia dua Kongreso al kiu ne povis ĉeesti nia amiko, restigita en lito de grava malsano per kiu morto kruela subjetis en ombbron tiu potencon cerbon, ni restas kortuŝitaj, kaj de nia plumo anstataŭ flui kanto el ĝojo kaj entuziasmo, fluas kanto funebra.

De la jaro 1905^a ke li per la estinta revuo «Joventut» konis Esperanton, kaj tuje, kune kun kelkaj samurbaj amikoj li eklernis nian lingvon kun plena fervoro, fervoro kiun li ĉiam metis en ĉiuj siaj entreprenoj, ĉar ni devas rememori, ke li estis ĝenerala sekretario de la societo «Centre Català» redaktoro de la ĵurnalo *Acció Catalana* en kiu li publikigis esperantan fakon, sekretario el la juĝantaro de la literatura konkurso organizita de la societo «Centre Industrial» dum la jaro 1906^a per kia sekretaria raporto li konigis siajn literaturajn konojn, kaj poste li sin konigis kiel rapsodo, legante tute ĝuste kaj klare kun la devigaj nuancoj kiujn havas en ili la plej bonaj literaturaj verkoj de niaj poetoj.

De tiu momento li iĝis varma propagandulo de tiu feliĉa solvo kreita de Dro. Zamenhof al grava demando de lingvo internacia, kaj dediĉis sian tempon, sian fortikan volon kaj fruktigajn klopodojn al tiu lingvo kaj al tiu ideo.

Estis la unua prezidanto de Esperanta Semo, unu el la plej malnovaj societoj el nia lando, kaj diversaj kursoj estis de li klarigitaj. Al kiom da gesamideanoj li konigis nian lingvon! Estis nediskutebla la vera fondinto de K. E. F. de tiu grava asocio de ĉiuj samlandanaj esperantistoj, kies nuna graveco kaj vivpotenco estis montrita de la ĵus okazinta kongreso en Tarragona, graveco kiun li ne povis ĝui.

Por tiu federacia ideo, li batalis longtempe, ĉar li estis ankaŭ unu el la fondintoj kaj redaktoroj de *Tutmonda Espero*, en kia kolekto oni povas trovi kelkfoje lian subskribon, kun la celo krei la Katalunan Esperantistan Federacion, sed tiam la tero ankoraŭ ne estis sufiĉe bone semita, kaj li atendis senlace, paciencie, la oportunan momenton por arigi la katalunajn esperantistojn.

Nia amiko malaperis, certe, tro certe ve! tamen homara ĉelo de potenco rǎdia antaŭ malaperi enigis en ĉirkaŭantaj ĉeloj sian propran celon kiun fatalo malpermesis lin plenumi. Li malaperis certe, tro certe bedaŭrinde, sed ne sia vivo, ĉar ĝi estis transdonita al Esperanto. Tiu, pli konkrete K. E. F. entenos longtempe en ĝi la impulson de lia puŝanta animo. Tiamaniere nia inda plorita kamarado venkas morton mem per tiu ĉi superorgana vivado postmorta, cirkonstanco observebla en la morto de ĉiuj grandaj homoj.

Inter lia literatura heredo li lasis kelkajn tradukojn de gravaj katalunaj verkoj kiujn ni intencas kolekti kaj publikigi kiel lasta Respekto al la memoro de tiu kiu estis dum sia vivo nia direktoro, nia amiko, kaj fervora esperantisto.

Sur nia skribotablo kuŝas ankoraŭ la lastaj paperfolioj de li skribitaj; ili estas la originalo por la preskompostado pri la premiitaj manuskriptoj de nia literatura konkurso; ili estis skribitaj kiam li jam estis enlitiĝinta, kaj ni devos gardi kaj konservi ilin kiel simbolo de la Homo kiun ne timigas la Morto, ĉar havas fortan volon por diri al ĝi: atendu! mi ankoraŭ devas dikti mian testamenton.

Al lia enterigo ĉeestis kelkcentoj da amikoj kaj samideanoj; Dro. Bremón kaj Sro. Santiago Mas, tenis nigran rubandon je la nomo de la Federacio kaj Esperanta Semo respektive, kaj la ĉerko restis preskaŭ kaŝita per naturflorkronoj senditaj de ĉi tiuj korporacioj kaj de la fraŭlinoj de li esperantigitaj.

Ke ni estu bonaj por sekvi la vojon de li signitan kaj tiel ni honoros lian memoron.

Al lia familio por kiu li estis ĉiam bona filo kaj frato, niajn plej sincerajn kondolencojn.

Pace ripozu.

K. E. F. KAJ K. E.



II^a KONGRESO DE KATALUNAJ ESPERANTISTOJ

ORGANIZITA DE

«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

SUKCESON ni esperis de nia II^a Kongreso. Ĝi preterpasis niajn esperojn. Kiel homoj, kiel esperantistoj, kiel federacianoj ni estas plenaj de ĝojo. La unuiĝo de la katalunlingvaj esperantistoj estas evidenta fakto substrekita krom per la Kongreso mem, per la

parolo de la delegitoj de la 40 grupoj reprezentitaj en ĝi. La laborado estis laciga sed la fina rezultato ĉion kompensas, kaj laŭ la elokventa parabolo de Pastro Coil, la kelkaj nuboj, kiuj trakuris nian ĉielon fariĝis belkoloraj per la radioj de la Esperanta Suno kaj nun ili pli beligas la pejzaĝon.

Dank' al la klopodo de niaj karaj geamikoj el Tarragono, nia Kongreso konstante prezidita de aŭtoritatuloj havis karakteron kvazaŭ-oficialan. Tio estis por ni plej grava venko. Esperante parolis la Urbestro dum la festeno kaj la Floraj Ludoj; esperante parolis la Prezidanto de la Alta juĝistaro Provinca, la prezidanto de la Deputitaro, la Delegito de la Financa Ministraĵo. Ili toastis esperante por nia Majstro kaj por ni; ili toastis por la interna ideo de nia movado, kaj ili uzis en tiuj momentoj nian internacian lingvon kvazaŭ por montri ke iliaj vortoj ne estas nur afablaj sed ankaŭ veraj kaj kore sentitaj.

La kataluna lingvo povis vidi en Tarragono siajn ĉieajn reprezentantojn. Inglada el *Alicante* gajnas la Naturan Floron per majstra tradukaĵo; Novejarque el *Valencio* gajnas premion kaj aliĝas per tuŝantaj vortoj al la Federacio; la Pireneo kaj la Insuloj sendas samideanojn, kaj el ĉiu flanko de nia lando ne tre oportuna por longaj vojaĝoj alvenis fervoruloj kun la koro plena de entuziasmo por Esperanto.

Nur kun la helpo ĉies povis okazi tiel granda manifestacio de nia ideo, kaj pri tio ni jam estis konvinkitaj kiam de antaŭ multe da tempo ni laboradis por la starigo de nia Federacio. Neniu restis surda al la voĉo de la logiko kaj esperantista fervoro, kaj nia vojo estas nun klara, rekta. Ĉiu, se sia loko povos kunhelpi kaj kunhelpos. Ni havu nur fidon al la estonta tempo kaj ni pliperfektigu interkonsente.

Ni rememoru nun per la raporto, kiun ni publikigas, la belan Kongreson II^{an} de nia Federacio, sed ni ne ripozu tro en ĝuo de la sukceso. Niaj samideanoj de *Vich* atendas nin por la III^a. Ni pretigu de nun, kaj dum la tuta jaro ni laboru fervore por Esperanto kaj por la plifortigo de la frataj rilatoj inter ni.

Vivu la «Kataluna Esperantista Federacio»!

ALVENO AL KONGRESURBO

Per la vagonaroj kiu foriras matene el Barcelona, multaj samideanoj vojaĝis al Tarragona, sed kiam estis pli granda la nombro, estis en la vagonaro kiu foriras je la 9^a.

La vojaĝo estis tre amuza, ĉar aparte la belaj vidaĵoj kiujn oni povas ĝui, la konversacioj, kaj la ridetantaj fraŭlinoj kiujn ni vidas ne nur ĉe ĉiuj stacidomoj, sed ankaŭ en n'ia vagono, ĉio tio estis kaŭzoj por pasigi tre bone la tempon.

Je la 12^a 15^a tagmeze ni alvenas al Tarragona, kaj en la stacidomo ni jam vidas Srojn. Pujulà, Bre-món, Pallejà, Dalmau, kun la urbkonsilantoj Sroj. Nel-lo, Vall-vé, Boldú, Gibert, Miró, kaj la Loka Komitato prezidita de sen-joro Molas.

Salutoj, manpremoj, flagoj flir-tantaj, kaj grava manifestacio, kiu sin direktas al la Urbdomo kie Sro. Cobos la Urbestro donis bonvenan saluton al ni; ankaŭ nin salutis Sro. Estivill je la nomo de la Provinca Deputataro; al ĉiuj respondis Dro. Bremón, per koraj kaj varmaj paroloj dan-kante la akcepton.

Militisto muzikistaro ludas *La Espero*, akompanata voĉe de la ĥoro «L'Ancora» antaŭ la Urbdomo, poste eksonas la notoj de La Rondo, kiu estas dancata de kel-kaj gesamideanoj: fotografistoj kaptas kliŝaĵojn, kaj ni iras inaŭgu-racii la Esperantistan Ekspozicion.

Ĝi estas tute bone aranĝita, kaj en ĝi ni vidis 142 malsamajn es-perantajn ĵurnalojn; la portreto de nia Majstro prezidas la salonon; oni estas disdoninta propagandajn foliojn por veki la scivolemon de la vizitantoj.

Estas la dua horo tagmeze, kaj ni iras rekte al Hotelo ĉar pres-kaŭ nenion ni manĝis dum la tago, kaj ni devas remeti fortojn en nia korpo, ĉar je la kvara okazos la unua labora kunsido.




JOAN MOLAS
Prezidanto de la Loka Komitato

LABORAJ KUNSIDOJ

UNUA KUNSIDO

Je la kvina posttagmeze la ĉefurbestro malfermis nian unuan laboron kunsidon kaj post kelkaj vortoj de li, esprimante la deziron ke ni atingu



GRUPO DE KONGRESANOJ ANTAŬ LA ŬRBDOMO

bonajn decidojn por niaj aferoj, transdonas la prezidon al prezidanto de K. E. F.

Dro. Bremón lin respondas, dankante al ĉiaj aŭtoritatoj el Tarragona la bonan akcepton kiun ili faris al ni.

Poste rememoras ke nia karega amiko Serdá, kaptita de grava malsano ne povas ĉeesti nian Kongreson, kaj ĉar li estis la vera animo de nia Federacio, ni antaŭ ekkomenci nian laboron, estas devigataj esprimi nian bedaŭron pro lia neĉeestado. Ĉiuj gekongresanoj staras kaj, aplaŭdas la vortojn de la prezidanto, kiu diras ke la aplaŭdoj estas por nia amiko.

Dro. Bremón legas la prezidantecan raporton, pri la laboroj de K. E. F. dum la jaro 1910-11. Jen ĝi:

«Jen ni, karaj kunfederacianoj, por la dua fojo kunvenintaj en Kongreso: jen ni, estimataj kolegoj, venintaj el ĉiu parto de Katalunujo, por partopreni en tiu ĉi granda kunveno montranta al nia samlandanaro la viclecon de nia ideo, pruvanta al la alilanduloj ke ankaŭ nia patrujo volas havi unu el la unuaj postenoj en nia sankta batalado...


En nia unua Kongreso, vi faris al mi nemerititan de mi honoron: vi nomis min estrarano de la Kataluna Esperantista Federacio, kaj miaj kunkomitatanoj bonvolis elekti min, sian prezidanton. Mi juĝas tion grava eraro; sed bona aŭ nebona prezidanto, la fakto estas ke mi estas tia, kaj ne nur montro de ĝentileco de mi al miaj samsocietanoj, sed ankaŭ devo mia al ĉiuj federacianoj, devigas min ĝeni dum kelkaj momentoj vian atenton por klarigi al vi la agadon de K. E. F. en la periodo de nia unua al nia dua Kongreso.

En la Sabadell'a kongreso, ni decidis la kreon de Literaturaj Konkursoj:

lando tiel literaturamema kiel la nia, lando, en kies urboj kaj urbetoj oni festas ĉiujare la reviviĝon de nia literaturo, bezonis ke ankaŭ en la esperanta movado movado montriĝu la amo al beletristiko: jen kial la literaturaj konkursoj estas kreitaj: pri la granda sukceso de nia unua konkurso, mi ne volas paroli: la prezidanto de la komisio speciale farita por ĝi, nia kara amiko kaj kunfederaciano Sro. Pujulà, diros al vi en la festo baldaŭ okazonta ĉion koncernantan tiun ĉi aferon: mi, en la nomo de la komitato de K. E. F, donas al li kaj al liaj kunlaborintoj sinjoroj Rosals, Serdà, Cordanu kaj Galcerán la plej varman dankon pro iliaj klopodo kaj laboro.

Aliaj decidon ni prenis en la unua Kongreso: mi parolas pri la kreo de la Havena Sekcio kies celo, kiel vi ĉiuj konas, estas la propagando de nia lingvo en fremdaj ŝipoj: mi invitas kaj esperas, ke Sro. Pellicer la sekretario de tiu subkomisio, konigos al la Kongreso ĝian agadon.

Mi devas konigi al la gefederacianoj, ke ekzistas en nia lando, nia studkomisio kreita laŭ decido de la Lingva Komitato en la V^a Internacia Kongreso, por studadi la verkojn kiuj aperas en Katalunujo. Ĝi havas nenian rilaton kun la Federacio, ĉar estas afero de la Lingva Komitato: sed, tial ke unu el la membroj de tiu komisio publikigis sian raporton pri verko tradukita el kataluna lingvo, en la organo de la Federacio, kaj tio povus kredigi ke la studkomisio pri ĉiulanda verkaro estas afero de la Federacio, mi decidis fari tiun ĉi averton por ke ĉiu sciu, kiaj rilatoj ekzistas inter la Federacio kaj la studkomisio kataluna.



LABORA KUNSIDO EN LA GRANDA SALONO DE LA URBDOMO

Ni havas motivon de ĝojo, tial ke la komitato de la Barcelona kongreso decidis doni la trionon rezultantan de la profito de la V^a, al la Federacio: tio estas ago de justeco, ĉar juste estas ke tial ke al la sukceso de la V^a kontribuis ĉiu grupo en nia lando, ili ĉiuj estu rekompencataj *per* la Federacio al kiu ili donis sian aliĝon.

La komitato de K. E. F. prezentas al via aprobo la regularon pri ekzamenoj, kaj la programojn por akiri la titolon de *kapableco* aŭ *profesoreco*. Mi esperas la diskutadon de tiu ĉi grava afero kiu kiel vi scias estas metita en la tagordon, por klarigi al vi la motivojn kiuj decidigis la komitaton de K. E. F. al ĝia prezento.

En la daŭro de nia interkongresa jaro, ni havis du grandvalorajn perdojn. Niaj samideanoj Sroj. Paul Berthelot kaj Muixi, pastro skolopiulo, forlasis nin: Sro. Berthelot, kvankam nefederaciano meritas memorajon nian: li, la unua, estis kiu provis fondi federacion katalunan: en la jaro 1905 nia fervora amiko tiam loĝanta en Ceret, kreis la «Aplec Esperantista de Katalunya» kies membro mi baldaŭ fariĝis, kiu enhavis membrojn de la franca kaj hispana Katalunujoj, kaj publikigis la *Espero de Katalunujo*, monata jurnaleto la unua aperinta en kataluna lingvo. Multaj el vi konis pastron Muixi: kora esperantisto, fervora federaciano, sincera amiko, li lasis veran rikolton en ĉiu urbo kie li povis semi: Castellar del Vallés, Terrasa, Vilanova kaj multaj aliaj urboj estas plenaj de liaj eksdiscipuloj: senkompata estis por ni la morto, kiu segis tiel frue tian por ni tiel valoran vivon!...

La nuna stato de la Federacio estas tre esperdona: ni havas 35 grupojn kaj societojn aliĝintajn, kaj pli ol 375 membrojn izolitajn: vi vidas do, ke en unu jaro ĝi vere fariĝis forta! Ni ĉiuj klopodu por ke ĝi senĉese kresku!

Mi finos mian paroladon per kelkaj dankaj vortoj: dankon, por la urbo Tarragona kiu tiel kore, frate, nin akceptis; dankon por la aŭtoritatuloj kiuj per sia helpo kontribuis al la kongresa sukceso: kaj varman, koran dankon por vi, membroj da la loka komitato, kiuj kun via prezidanto nia estiminda amiko Molas, klopodis laboris, penadis por vidi la efektiviĝon kaj sukceson de la II^a Kongreso de Katalunaj Esperantistoj.»

Poste la delegitoj de la aliĝintaj grupoj, prezentas la dokumentojn liveritaj al ili de siaj societoj.

Dum la societaj delegitoj prezentas la dokumentojn estas legita poŝtkarto de Dro. Zamenhof, salutante nian duan Kongreson, kaj la ĉeestantaro aplaŭdas bruege, ekkriante vivu nia Majstro!

La esploro de la delegitaj dokumentoj montris la jenan rezultaton.

Lluís Llopart, por *Amo Kaj Espero*; Santiago Mas, por *Monta Grupeto*; Josep Soler, por *Esperantista Grupo*, el Mataro; Josep Coll, por *Gerona Esperantistaro*; Anton Clivilles, por *Nova Semo*; Jaume Marcé, por *Fratego*; Joan Casajoana, por *Komerca Fako*; Josep Ventura, por *Lumon*; Josep Pi, por *Olota Stelo*; Joan Aubeyzon, por *Supren!* Francisco Mestres, por *Laboro Esperanta*; Lluís Coll, por *Esperanta Amo*; Lluís Gubernado, por *Semo*; Ramon Soler, por *Ĉiam Antaŭen*; Santiago Puigbonet, por *Esperanta Nesto*; Dro. Joaquim Coll Pbre, por *Esperanta Akvofalo*;

Josep Anglada, por *Esperanto kaj Patrujo*; Joan Campdelacreu, por *La Rondo*; Antoni Marti, por *Esperanta Semo*; Francisco Moya, por *Forigu Barojn*; Rosèn Roig, por *Casino del Comercio* Jaume Gillomia, por *Esperanta Frateco*; Josep Grau, por *Barcelona Stelo*; Artur Torné, por *Universala Frateco*; Pastro Joaquim Coll, por *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*.

Ankaŭ estis ricevitaj salutoj de *Escola Universitaria*; *Vika Esperantistaro*; *Esperanta Grupo*, el Cervia; *Grupo Esperantista*, el Arbós; *Esperanta Fako*, el Ateneo Obrer Martinense de S. Martí de Provencals (Barcelona); *Biblioteka Museo Balaguer*, *Fomento del Trabajo*, *Orfeo Vilanovi*, kaj la *Urbeŝtaro* el Vilanova y Geltrú; *Orfeo Tarragoni*; de Sro. Angel Novejarque kaj telegramon de Sro. Vicente Inglada, redaktita jene: «*Korsaluton al ĉiuj kaj grandan sukceson al Kongreso. Inglada.*»

Sro. J. Piferrer, nia diligenta kasisto-administranto, legas la finanĉan raporton, klarigante kelkajn elspezojn de la jaro 1910 kaj konstatante la bonan antaŭeniradon de K. E. F. pri la monafero.

Unuvoĉe estis aprobitaj la kalkuloj publikigitaj en la Frebruara numero de K. E. kaj Sro. Mestres, el Vilanova y Geltrú, proponas danki per aplaŭdo Sron. Piferrer pro lia bona laboro, aplaŭdo kiun aprobas ĉiuj.

Sekvante la tagordon estis metita je la diskutado la aldono de la jenaj vortoj. «La delegitoj de K. E. F. estos rekompencitaj per la kvanto da 5 % el la kotizaĵoj, pro elspezoj de ili faritaj» al la VI^a artikolo de nia Regularo.

Post malgranda diskutado en kiu partoprenis Sroj. Pujulà, Campdelacreu, Pallejà, Dalmau, Piferrer, kaj Grau, estis aprobita kun la jena klarigo «la delegitoj povas konservi, se tion ili kredas konvena, la kvanton da 5 %, k. t. p. k. t. p.» Tiu reformo estis prezentita de la komitato de K. E. F.

Sro. Bordas, el Barcelona, demandas klarigojn al la Prezidanto pri noto publikigita en la Barcelonaj ĵurnaloj kiu diris ke la societo Espero Kataluna decidis ne sendi delegiton al la Kongreso.

Dro. Bremón, diras ke E. K. estas ankoraŭ aliĝinta al K. E. F. kaj petas de Sro. Rosals, prezidanto de E. K. ke li bonvolu klarigi la aferon.

La respondo de Sro. Rosals estas ke E. K. ĉiam restos fidela al la Federacio, kaj ke se iuj personoj nun agas kontraŭ ĝi, li ne povas kontraŭstari tion, sed li kondamnas la agon de l' personoj kiuj sendis tiun noton al la ĵurnaloj sen esti rajtigitaj por agi tiamaniere.

Sro. Pujulà, per varmaj vortoj dankas Sron. Rosals pro la klarigoj de li faritaj antaŭ la Kongreso.

Sro. Campdelacreu, petas ke la Kongreso deklaru ke la oficiala nomo de la Federacio nur estas «Kataluna Esperantista Federacio» esperante, kaj «Fedeŝació Catalana d'Esperantistes» katalune, kaj la Kongreso faras tian deklaron.

Tiel finiĝis la unua kunsido ĉar estis jam sepa horo kaj la urbeŝtaro atendis la kongresanojn por ilin regali per Koncerto kaj Honora Vino.

La prezidanto rekomendas al la kongresanoj la akuratecon por la dua kunsido kiu devas okazi la morgaŭan tagon.

DUA KUNSIDO

Je la 10^o50^a horo mantene Sro. Bremón malfermas la kunsidon.

Oni ekkonmencas diskuti la du reformojn al la Regularo prezentitajn de Sro. Pujulà. Pellicer, Rosals, kaj Dalmau.

Post grava kaj interesa diskutado, en kiu partoprenis Sroj. Pallejà, Dro. Coll, Pujulà, Piferrer, Dalmau, Grau kaj la Prezidanto, la kongreso aprobis la jenajn decidojn.

Rifuzi la unan aldonon, tio estos, ke la grupoj aŭ societoj pagos kotizaĵon por difinita kvanto da membroj kaj ke la Federacio donu al ili tiom da ekzempleroj de K. E. kiom da kotizaĵoj ili pagos; kaj ke la riprezentantoj de la societoj aŭ grupoj havu ankaŭ la rajton voĉdoni tiom da fojoj kiom da kotizaĵoj ili pagos.

Aprobi la duan aldonon kiu starigas:

I. Konsultan Komitaton, formitan de ĉiuj Prezidantoj de societoj aŭ grupoj aliĝintaj al K. E. F:

II. Ke estu Prezidanto de ĉi tiu Komitato la plej maljuna el ĉiuj kaj Sekretario la plej juna.

III. La Komitato decidos kiamaniere estos pagitaj la elspezoj okazigitaj pro la aranĝo kaj funkciado de ĝi; kaj la materiala helpo kiun devos doni al la Federacio la aliĝintaj grupoj.

IV. La rajto partopreni en tiu Komitato estas persona kaj ne transdonebla.

Aprobitaj la antaŭaj reformoj estis legitaj la sekvantaj komunikaĵoj.

De Sro. J. Altura, el Sabadell, pri bezono altiri al Esperanta movado la laboristojn.

De Sro. R. Palleja, el Ulldemolins, pri propagando de Esperanto en vilaĝoj.

Kaj de Sro. J. Anglada, el Barcelona, pri la fondo de ekzamenkomisio pri verkaro.

Tiuj Komunikaĵoj ne estis diskutitaj ĉar ili ne estis prezentitaj kiel proponoj, sed Sro. Pujulà petis permeson por respondi al Sro. Anglada, kaj post la demando al la kongreso ĉu oni povas malfermi diskuton pri tiu afero, li refutis la argumentojn de la Komunikanto. En la diskutado ankaŭ partoprenis Sroj. Piferrer kaj Dro. Coll.

Laŭ la tagordo estis metita al la aprobo de la Kongreso, la regularo de *Atesto pri lernado kaj profesoreco*.

La Prezidanto Dro. Bremón defendas la necesecon, ke kleraj personoj certigu kaj rajtigu, — laŭ rezultato de la ekzamenoj — la kapablecon por instrui Esperanton, kaj konsekvence ke estas necese nomi oficialajn profesorojn.

Dro. Coll, prezentas aldonon kiu diras ke ĉiuj esperantistoj akirintaj tri ordinarajn premiojn de tradukaĵo en niaj Literaturaj Konkursoj, estu ankaŭ diplomitaj kun la atesto pri Profesoreco.

Post malgranda diskutado estis aprobita la jena reformo «Estos diplomitaj kun atesto pri Profesoreco la akirintoj de tri ordinaraĵaj premioj de traduko en la Literaturaj Konkursoj organizitaj de K. E. F. Oni devos submetiĝi al la ekonomiaj kondiĉoj, starigitaj por la akiro de ĉi tiu diplomo».

Sro. Campdelacreu demandas ĉu nur estos ekzamenitaj ĉiuj kiuj lernis esperanton per Katalunaj gramatikoj, aŭ ĉu ankaŭ oni akceptos ekzameni laŭ kastilaj gramatikoj.

Sro. Pujulá lin respondas, ke por ni Katalunoj, estas tute komprenebla la neceseco scii la katalunan lingvon, por lernigi Esperanton al katalunoj, kaj ke se iu ne scias bone sian propran lingvon ne estas logike ke li pretendu akiri titolon de profesoro donita de Federacio kuŝanta en lando kies lingvo li ne konas.

Sro. Rodellar ankaŭ prezentas aldonon kiu diras ke la lernantoj estu ekzamenitaj per Kataluna aŭ Kastila gramatiko, laŭvole, ĉar tiel estas pli vasta la kampo por la lernantoj, «tiu propono estis rifuzita ne akceptinte diskuton pri ĝi »

Okazis poste tre grava diskutado en kiu partoprenas Sroj. Pallejà, doktoro Coll, Grau, Brú, Rodellar, Dalmau, Campdelacreu, Pujulá, kaj la Prezidanto, dum kiu estis prezentitaj kelkaj reformoj kaj aldonoj, sed fine la nomitaj sinjoroj interkonsentis, prezentante la jenajn aldonojn kiuj estis aprobitaj unuvoĉe. «La ekzamena tribunalo kunvenos en Barcelona, ĉiam, kiam dek membroj, dezirantaj, ekzameniĝi, petu tion, kaj en aliaj urboj, kiam almenaŭ tri membroj pagu la elspezojn por vojaĝoj k. t. p. Ankaŭ ĉiujare oni kunvenos en la kongresurbo kaj kongresaj tagoj.»

«La Kongreso decidus esprimi la plej sinceran konfidon al la komitato de K. E. F. por elekti la unuan ekzamenan tribunalon el la federacianoj.»

«La Kongreso decidus ke estu la komitato de K. E. F. kiu devas nomi la profesorojn por formi la ekzamenajn tribunalojn.»

Je la unua horo tagmeze finiĝis la dua kunsido, ĉar kelkaj el la ĉeestantoj devas ĉeesti oficialan festenon kune kun la aŭtoritatoj.

TRIA KUNSIDO KAJ FERMO DE LA KONGRESO

Je la kvara kaj duono Dro. Bremón malfermas la kunsidon kaj oni legas komunikaĵon el «Vika Esperantistaro» petantan al la Kongreso ke nia III^a okazu en Vic.

La Prezidanto demandas ĉu oni akceptas la proponon, kaj la Kongreso unuanime respondas Vivu nia tria en Vic!

Poste la Prezidanto permesas dek minutojn da libertempo por ke la kongresanoj interkonsentu pri la novaj anoj por formi la komitaton 10:11-12: kiam la Prezidanto remalfermas la kunsidon, Sro. Pujulá petis permeson por paroli je la nomo de kelkaj kongresanoj, petante al la Kongreso ke unuanime elektu por la nova komitato la jenajn sinjorojn, Sro. Dro. Bremón Masgrau, el Barcelona, Sro. J. Pífferrer Rifà, el Sabadell, Sro. E. Pellicer,

el Barcelona, Sro. J. Planas Sadurni, Pastro, el Barbarà del Vallès, sinjoro J. Palmarola, el Vic.

Sro. Pujulà per varmaj paroloj prezentas la novajn komitatanojn, laŭdante la agadon de Sroj. Piferrer kaj Bremón dum la lasta jaro, kaj la entuziasmon kaj fervorecon kiujn havas por nia lingvo kaj la Federacio sinjoroj Pastro Planas, Pellicer kaj Palmarola.

La Kongreso akceptas korege la proponon de Sro. Pujulà kaj aplaŭdas bruege la novan ĵus elektitan Komitaton.

Sroj. Dalmau kaj Dro. Coll petas al la kongreso ke ĝi esprimu la plej koraĵajn dankojn al la komitato de K. E. F. kaj ankaŭ al la Loka komitato, por la bona aranĝo de la Kongreso.

Kelkaj societaj delegitoj salutas la Kongreson je la nomo de la neĉeestantaj samideanoj, speciale Dro. Coll, kiu deklaras per elokventaj paroloj, ke kvankam siaj katolikaj amikoj nun fondis esperantistan ligon, ili ĉiam restos ĉe nia flanko, ĉar kiel katolikoj ili estos en *Katolika Esperantista Ligo*, kaj kiel Esperantistoj, ilia devo estas resti en la vicjo de K. E. F. Li finas proponante sendi telegraman saluton al Sro. Serdà.

La germana esperantisto Sro. Fritzching, kiu estis inter ni la du tagojn ankaŭ parolis, esprimante sian gratulon pro la kora gastameco trovita de li inter ni.

La Urbestra riprezentanto Sro. Vallvé, adiaŭas la kongresanojn, petante ke ili konservu bonan rememoron el Tarragona.

La Prezidanto, dankinte la ĵurnalojn el Tarragona, Barcelona kaj aliaj urboj, kiuj pro la propagando de ili farita helpis la bonan sukceson de nia II^a Kongreso, fermas ĝin kun la krioj Vivu la III^a en Vic! Vivu nia Majstro! Vivu Esperanto!

KONGRESAJ FESTOJ

LITERATURA KONKURSO

La disdonado de premioj al la aŭtoroj de la premiitaj manuskriptoj estis unu el la plej belaj festoj de la Kongreso.

Ĝi okazis en la teatro-salono de la «Patronat de l'Obrer». Je la horo antaŭfiksita por la komenco estis neeble transiri la salonon. Ĉie oni vidis belejn, junajn fraŭlinojn kies helaj vestaĵoj frapis la okulon de ĉiu eniranto. En ĉiuj anguloj de la salono freŝaj ridadoj, vivplenaj interparoladoj sin aŭdigis. Tiu granda salono estas nesufiĉa por enteni la grandan nombron de personoj tien kunvenintaj.

Sur la dekstra flanko de la scenejo ni vidas la komitaton de K. E. F. kaj la ĵugantaron de la konkurso; sur la maldekstra flanko oni povas vidi la tarragonajn Urbestron, Prezidanton de la Provinca Deputataro, Provincan Guvernestron k. t. p. Sro. Cobos, urbestro, elparolas la tradician frazon: *Oni malfermas la feston.*



FESTO DE LA LITERATURA KONKURSO

Sro. Pujulà bedaŭras ke Sro. Serdà de Sabadell, Sekretario de la Literatura Konkurso ne povas ĉeesti la feston pro sia malsano, kaj sekve ne povas legi la raporton persone; tion faras Sro. Bordas, kiu anstataŭis lin.

Jen unu el la plej gravaj paragrafoj de la sekretaria raporto.

«Ĉefe, nia afero estas lingva, kaj la Floraj Ludoj Esperantistaj en nia lando nur povus esti utilaj kaj fruktoportaj taŭgante kiel perfektigilo de la du branĉoj de la arbo de nia Literaturo: la branĉo, kiu produktas la fruktojn originalajn, kaj tiu, kiu ellaboras post greftado la fruktojn produktitajn de la arboj de la naturaj lingvoj. Tial ili decidis ke la ordinaraĵoj estos ĉiam apartigitaj en du grupojn konsistantajn el originalaj kaj tradukitaj tekstoj, kaj kompreneble ke en ĉiu grupo oni aljuĝos tiom da graveco al la versaĵoj kiel al la prozaĵoj, ĉar en ambaŭ povas troviĝi Beleco kaj Poezio, — ĉefaj celoj de niaj Konkursoj, — nepraj gastoj de la perfektigo de nia Lingvo.

Ni devas konfesi ke la tekstoj elektitaj kiel tradukotaĵoj estis vere malfacilaj kaj plenaj de *kaprompiloj*, sed oni ja deziris pravi laŭ evidenta maniero ke Esperanta lingvo estas vere literatura lingvo, kaj la belaj tradukaĵoj, kiujn la juĝantaro premiis montris la veron de tiu aserto. Per ili la aŭtoroj neniel perfidis la originalajn verkojn kaj konstatinde estas, ke se ni komparas la originalajn esperantistajn verkojn kun la tradukaĵoj, ni devos deklari tiujn ĉi plej bonaj.

La juĝantaro de la versaĵoj opinias ke la senditaj verkoj estis pli bonaj

kiel esperantaĵoj ol kiel poeziaĵoj. La lingvo en ili estis tre bone servita; la ritmo kaj la rimo multe suferis kaj plendis. Oni ja povas esti tre bona esperantisto kaj eĉ prozisto, kaj tamen ne kunloĝi en bonaj amikaj rilatoj kun tiuj du postulemaj sinjorinoj. Tamen la premiita per la Natura Floro versaĵo estis tiel korekta kaj ĝusta, tiel poeziplena kaj unuvorte majstra, ke la juĝantaro ne dubis ne aljuĝi al alia ia verko la ĉefan plej honoran premion.»

Sro. Bordas poste, sciigas la nomojn de la laŭreatajn aŭtorojn:

Aŭtoro de la traduko de «La Vaca cega» kiu laŭ la antaŭa raporto rajtas elekti reĝinon de la festo, estas Sro. V. Inglada i Ors pro sia traduko kies devizo estas «El ĉiuj estaĵoj la blinda, sendube la plej kompatinda».

La leŭtenanto Sro. Francisco Ibañez je la nomo de Sro. Inglada akompanas la reĝinon fraŭlinon Maria Caballero al ŝia trono. Ŝi estas sekvata de la «Kortego de Amo», kiu estas formata de dek belegaj fraŭlinoj. Tiuj ĉi fraŭlinoj, ĉarmaj tarragonaninoj el kiuj tri reprezentas la kursaninojn de Esperanto, iras akompanataj de individuoj de la Loka Organiza Komitato, Juĝantaro de la konkurso, k. t. p. kaj elvokas pro ilia beleco kaj eleganteco de tualetoj, bruan komentariaron: el ĉiuj lokoj de la teatro aŭdiĝas voĉoj de admiro. Dum la trairado al la scenejo la aplaŭdado de la ĉeestantaro estas senĉesa kaj bruega.

La reĝino sidas en ŝia trono, kaj apud ŝi, kunprezidas la feston la «amkorteganinoj». En la nomo de la poeto premiita, Sro. Ibañez prenas la Naturan Floron, belega bukedo el floroj, kaj prezentas ĝin al la Reĝino de la festo, kiu metas ĝin ĉe siaj piedoj: en la bukedo oni vidas grandan verdan silkubandon sur kiu oni legas «1^a Literatura Konkurso de K. E. F.»

Sro. Grau legas tre bonstile, la jenan premiitan poezion:

LA BLINDA BOVINO

Senvole per la kap' ektuŝegante
 Je unu kaj alia trunk', sencele
 Iradas sur la voj' al trinkoloko
 Bovino, kiu venas tute sola.
 Ŝi blinda estas. Paŝtistet' per frapo
 De ŝton' al ŝi tro lerte surjetita
 Okulon unu ŝian difektegis,
 L' alian membraneto nubekovras:
 Jen blinda estas la bovin'. Ŝi venas
 Al font' por trinki, kiel ŝi kutimis;
 Sed ne kun firma la sinten' tiama,
 Nek kun kolegoj siaj, ne: tutsola.

Alpaŝas ŝi. Fratinoj ŝiaj dume
 Ĉe krutegrokoj, sur la plataltaĵoj,
 En la silent' herbeja, ĉe l' akv-bordoj,
 Sonigas pendtintilon, freŝan herbon
 Manĝante laŭ plezuro... Ŝi ja falus.
 L' akvujon akrerandan ektuŝegas
 Ŝi per la buŝ' kaj honte sin retiras.
 Sed ŝi revenas, sian kapon metas
 En l' akvon kaj eltrinkas malrapide.
 Ŝi trinkas sen soifo, nur malmulte.
 Kun granda tragedia gesto, poste
 Ŝi levas al ĉiel', egan, la kapon
 Kornhavan: sur senvivaj la pupiloj
 Ŝi palpebrumas kaj denove venas,
 Je lumo orfa sub brulanta suno,
 Malfirme sur la voj' neforgesebla,
 Malvigle balancante la longvoston.

Oni sciigas poste la nomojn de la ceterajn premiitajn aŭtorojn kiuj estas: De la originala temo, poezio: Sro. Josep Ventura, de Terrasa pro sia poezio «Rozoj kaj dornoj».

De la originala temo, prozaĵo: Sro. Joan Aubeyzon pro sia verko «Malkuraĝeco». De la tradukita teksto «Conformitat», el Victor Català: Sro. Estanislau Pellicer, pro sia tradukaĵo kies devizo estas, «Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras».

La premion de «Esperanta Semo», de Sabadell, gajnis pastro S. Pubill skolapiulo, pro la sekvanta traduko de la poezio «La Ratlla», el Guanyabéns kies devizo estas «Kripligo».

LA LINIO

En ebenaja mezo, freŝema, ridetanta,
 Glitigas sian akvon la Segro murmurant':
 Dum sian vojon sekvas, transiras la landlimon,
 Landlimon nenaturan, laŭ faras la vivant'.
 Nek signas ĝin montaroj, nek ĝin malamikecoj:
 Ambaŭ estas niaj, kutimoj, tradici':
 Jam sole du standardoj elmontras kelkafoje
 Patrujojn kripligitajn por formo de naci'.
 En tiuj ambaŭ flankoj, nek paŝo nin disigas:
 Nek lingv' aŭ karaktero de l' miaj ŝajnas for:
 En ambaŭ flankoj estas mi en Katalunujo:
 Lini' en landkart' estas, neniel en la kor'.

LAŬREATAJ AŬTOROJ

VICENÇ INGLADA



JOAN AUBEYZON



ALFONS SABADELL



FINO, EULARIA ROSSELL

La premion proponitan de Sro. Fred. Pujulà i Vallès gajnis la ĉarma fraŭlino Eularia Rosell pro sia versduo «Katalunlando», kiu de nun estos la devizo de K. E. F.

Sro. Alfons Sabadell, gajnis la premion proponitan de *Catalunya Nova*, de Tarragono, pro la traduko de parolado de Sro. Folch i Torres kies devizo estis «Vi frato alveninta de malproksima tero...»

La premion proponitan de Sro. Direktoro de l'«Institut de Tarragona», gajnas Sro. Estanislau Pellicer, pro la traduko de rakonto de Apeles Mestrès, sub la devizo «Ankoraŭ...»

Sro. Angel Novejarque, gajnas la premion de la «Cambra de Comerç», de Tarragona, pro sia tradukaĵo, sub la devizo «Ĉu?...».

Pastro Dro. Coll, gajnas la premion de l'«Patronat Obrer de Tarragona», pro sia verko «Frato helpita de aliaj fratoj estas forta urbo».

La laŭreataj aŭtoroj siavice iras ricevi de la belaj manoj de la

LAŬREATAJ AŬTOROJ



JOAQUIM COLL, PBRE.



ANGEL NOVEJARQUE



ESTANISLAU PELLICER



JOSEP VENTURA

reĝino la gajnitan premion. Ĉiu ricevas longajn kaj varmajn aplaŭdojn.

Fine Sro. Pujulà legas la jenan belan paroladon :

Honorinda kaj ĝentila Reĝina Moŝto,
 Honorindaj kaj ĝentilaj fraŭlinoj,
 Eminentaj aŭtoritatuloj,
 Sinjorinoj kaj sinjoroj:

Al ĉiuj mi turnas, en la de miaj kolegoj kaj en mia propra nomo, nian plej profundan kaj respektoplenan dankon por la helpo, kiun vi alportis al nia Festo de Poezio kaj Amo.

Nian dankon al vi, bela Reĝino kaj belaj Sekvantinoj, kiuj per via gracio plektas allogan kronon ĉirkaŭ la Belec kaj Juneco kiu nin prezidas. Se per via ĉarmo kaj beleco vi plej ĝuste reprezentas ĉi tie la Poezion, per via juneco vi reprezentas la forton de la vivo, la sopiradon al noblaj superaj sentoj, la eternan renoviĝon de la ĉiam pliperfektigema naturo. Certe la Festo, kiu nin

kunvenigas hodiaŭ, lasos ĉe vi impreson, kiu trovos varman restejon en viaj koroj, kaj morgaŭ, post kelkaj jaroj, kiam vi prezidos hejmon tiel majeste kiel nun prezidas nin, vi rememoros al viaj ĉirkaŭantoj pri tiu ĉi aro da entuziasmaj homoj, kiuj al la frenezo predikadi la Lingvon Internacian aldonas la frenezon kredi je la efiko de Amo kaj ami la Belecon per ĉiuj siaj fortoj. Pekoĵ estas ĉi tiuj, kiujn la plimulto da homoj ne pardonas nun; sed ni tamen ne haltas nek senkuraĝiĝas, ĉar ne nur, ni ne parolas por la plej multaj sed por la plej bonaj, sed ankaŭ la plej multajn vi bonigos se vi turnas al ili vian junulinan rigardon plenan de mildeco por ili, plenan de espero por la estonta tempo.

Nian dankon al vi, eminentaj sinjoroj reprezentantoj de la Aŭtoritato kaj de la Popolo en tiu ĉi antikva urbo. Ĉeestante nian Feston kaj prezidante ĝin vi sekvis la tradicion de nia lando, laŭ kiu la Aŭtoritato partoprenas en la festoj de Poezio kaj Amo, kvazaŭ dezirante firme konstatigi ke nur en ili troviĝas la plej bonaj reguloj por la kondukado de la homoj; sed vi certigis laŭ evidenta maniero ke laŭ via opinio, Poezio kaj Amo, Belo sin trovas en nia helpa lingvo tiel bone kaj komforte kiel en la natura. Sinjoroj, vi permesu, ke al la danko mi aldonu gratulon. La nomoj de la estroj de Tarragono pleniĝis longajn paĝojn de la Homara Historio, kaj tiu tradicio ankaŭ estos sekvita, ĉar morgaŭ, kiam la Internacia Lingvo akiros ĉie oficialan karakteron, kiam la maturaj homoj, lernintaj dum siaj junjaroj ĝin en la unuagradaj lernejoj kaj aŭdintaj ĝin en siaj luliloj mem, ne havos mokon nek ridon por ĝi kaj juĝos ĝin kiel la plej naturan kaj logikan kreitaĵon, tiam oni lernos kun miro la gravajn batalojn, kiujn fervoraj homoj devis organizadi por la atingado de ia homa interkompreniĝo, kaj oni nur laŭdojn kaj aplaŭdojn havos por tiuj, kiel vi respektindaj Moŝtoj, kiuj detenante la povon en siaj manoj havis la kuraĝon veni inter nin kaj antaŭsentis la veron kaj la justecon de nia predikado. — Sajnas kvazaŭ la premanta priokupo de la registroj de tiu ĉi urbo estis ĉiam la defendo de ĝiaj loĝantoj kontraŭ eksteraj malamikoj. Konstruis la Ciklopoj la fortegan muregon, kiun vi montras kun fiero al fremdaj kaj eksterurbaj vizitantoj. Kartaganoj, Grekoj, Romanoj, Mezepokanoj, ĉiuj rivaliĝis en la plialtigo kaj plifortigo de tiuj muregoj, — ŝtona zono, monumenta ŝirmilo, kiu estas la plej bela juvelo de la krono de via urbo. Vi ankaŭ plialtigis kaj plifortigis ilin, vi ankaŭ celis la protekton de viaj regatoj, sed nun, ĉar la malamikoj ne estas homoj, ĉar la malamikoj estas nur malespero, anima malforteco, nekonfido al la estontaĵo kaj morala defalemo, vi ne per ŝtonoj plialtigis la muregon sed per plej alta anima virto, vi ĉirkaŭstarigis ĉirkaŭ la urbon protektantan muregon el Espero, kaj vi metis sur la brustojn de la tarragonanoj la ŝildon de nia kvinpinta stelo je kiu ĉiu mortiga sageto de la novaj malamikoj malakriĝas kaj resaltas en terenfalantajn splitaĵojn.

Nian dankon fine al ĉiuj poetoj kaj prozistoj, kiuj volis labori por nia Festo kaj respondis al la Alvoko sendante ĉu originalajn ĉu tradukitajn verkojn. La momento de la batalo inter ili por akiri la premiojn jam estas pasinta. Ĉiu faris, kion li povis; la verkistoj per sia talento; la juĝintoj per sia honesta juĝo. La premioj estas jam disdonitaj, kaj jam por ni ne estas plu

premiitoj kaj ne premiitoj, sed aro da entuziasmaj samideanoj al kiuj ni turnas senescepte nian dankon sinceran, kaj nian gratulon.

Ni prenu ekzemplon en tiu ĉi grava festo kronita per plej granda sukceso kaj ni ĉiuj denove, fervore kaj entuziasme laboru por ke la venontaj estu tiel sukcesplenaj kaj plenaj de bono por la diskonigo de nia literaturo enlanda kaj la pliriĉigo de nia jam riĉa, fortika bela kaj admirata de ĉiuj Esperanta Literaturo.

Grandega aplaŭdado sin aŭdigis je la fino de tiu ĉi parolado, kiu kuniĝas kun la aplaŭdado dediĉita al la reĝino de la festo kaj korteganinoj forlasantaj la salonon. La festo estis sukceso, granda, unu el la plej grandaj sukcesoj de la Kongreso.

HONORA VINO

Tuj post la unua labora kunsido, la kongresanoj pasis al ĉambro de la Urbdomo kie urbestro kaj urbkonsilantoj plej ĝentile gastis ilin. Ne estis esprimebla al la kongresistoj la ĝojo kaj entuziasmo kiujn ili sentis pro la kora akcepto kiun Tarragona faris al ili.

RELIGIA DISERVO

Ĝi estis oferita de nia kunfederaciano Pastro Planas, el Barberà del Vallès, kaj estis kantita kun gregoria kanto akompanita de grava ĥoro.

La sankta katedro estis okupita de Pastro Coll, kiu predikis en esperanto pri la temo «La universala Amo en la Sankta Koro de Jesuo, kaj Esperanto kiel rimedo por ĝin akiri».

OFICIALA FESTENO

Je la 1.^a horo kaj duono de la 25^a Junio okazis la festeno per kiu la grupo «Tarragona Esperanta» regalis la aŭtoritatulojn kaj kongresanojn. Ĉirkaŭ la tablo kunsidis preskaŭ 100 gesamideanoj inter kiuj oni vidis kelkajn fraŭlinojn.

Prezidis la urbestro Sro. Cobos, kaj apud li sidis: Prezidanto de K. E. F., Dro. Bremón; Sroj. Cavallé, Vicprezidanto de la Provinca Deputitaro, kaj Pujulà i Vallès, Sekretario de la provinca gubernestro, Prezidanto de la Alta Provinca Juĝistaro, Sro. Marin; Prezidanto de «Tarragono Esperanta» kaj de la Loka Komitato, sinjoro Molas; Delegito de financoj, Sro. Carrillo de Albornoz. Ni ankaŭ

vidas Srojn. Nel-lo, Miró, Dalmau, Nin, Balcells, Garcia, Grau kaj Vallvé, urbkonsilantojn, kaj la reprezentantojn de la lokaj ĵurnaloj *La Cruz* kaj *Diario de Tarragona*.

Oni servis laŭ la jena menuo:

Diversaj almanĝaĵoj.—Makaronioj *Rossini*.—Merlango kun saŭco *mayonnaise*.—Bovido *Perigot*.—Galantino lango *Bellevue*.—Rostita kokido.—Glaciigita biskvito.—Desertoj.—Vinoj: blanka kaj ruĝa. Ĉampano. Kafo. Cigaroj kaj likvoroj.

Antaŭ la desertoj la urbestro Sro. Cobos komencas la tostadon kaj post li parolas la Sekretario de la provinca guvernestro kaj Sro. Carrillo de Albornoz: la tostoj de tiuj sinjoroj estas finataj per esperantaj vortoj kiujn la ĉeestantaro aplaŭdis kun varmo. Tostas ankaŭ Sroj. Marin, Cavallé je la nomo de la Provinca Deputataro, Molas je la nomo de la tarragonaj esperantistoj kaj Pastro Coll. Sro. Soler je la nomo de sia patro, la direktoro de la Gimnazio kaj honora prezidanto de la grupo «Tarragono Esperanta», Sro. Pujulà i Vallès kiu faras belan komparon inter la roma akvokonduko staranta proksime de Tarragono kaj la interna sento de Esperanto; Sro. Balcells je la nomo de la societo «Atracció de Forasters» (*Syndicat d'Initiative*), Sro. Nel-lo urbestra adjunkto, kaj Dro. Bremón Masgrau, Prezidanto de K. E. F., kiu fermas la tostojn salutante Tarragonon kaj ĝiajn aŭtoritatajn moŝtojn, kaj petante aplaŭdon por Sro. Molas, Prezidanto de la Loka Komitato, kiu faris ke nia Kongreso estas tiel grave sukcesinta. Ĉiujn tostojn oni akceptis per longa aplaŭdado.

Laŭ propono de Sro. Pujulà oni sendas dokumenton subskribitan de ĉiuj ĉeestantoj, al Dro. Zamenhof, lin salutante plej kore dum la II^a Kataluna Kongreso.

Fine la kunmanĝintoj kantis starante la himnon «La Esperon» kun granda entuziasmo kaj la krioj «Vivu Esperanto» kaj «Vivu la Majstro» finas la festenon.

KONCERTO

En la ĉarma teatro de la «Patronato del Obrero» okazis la anoncita koncerto de la «Orfeo Tarragoní».

Granda nombro da gesamideanoj kaj ankaŭ da neesperantistoj tute plenigis la teatron. Oni vidis tie sinjorojn Pujulà, Bremón, Molas kaj aliajn amikojn estimatajn.

Sub lerta direktado de Profesoro Josep Gols, komencis la kantado: oni kantis ĝuste kaj bele, dum la unua parto la jenajn muzikaĵojn:

Himne a la Senyera (Gols), *La Pastoreta* (Candi), *La Verema* (Lassus), *Primavera Eterna* (Morera), *La najtingalo* (Mas Serracant), *Somni de Primavera* (Mendelssohn) kaj *Aucellada* (Jannequin).—El tiuj, meritig grandegan aplaŭdodon, kaj pro tio oni ilin devis kanti denove, *La najtingalo* (esperante kantita) kaj *Aucellada*.

Kaj nun la ĉeestantaro sin dediĉas al la babilado, ĉar l'«Orfeo» ripozas dum kelkaj momentoj. — Ni havis la plezuron interparoladi kun la fraŭlinoj de la «Orfeo Tarragoni» kiuj vere sin montris tre afablaj kaj nin sciigis gracie pri la nomo de tiu fraŭlino kantinta la solparton de *La najtingalo*: Rosalia Borrás en esperanto, tre ĝuste kantis tian parton.

Kaj komencis la dua parto kiu ja estis tre interesa. *Sola l'Olm* estis majeste kantita: *La Barcarola* (Gols) ankaŭ ĝustege kantita, sed tiu, kiu, funden eniris en ĉies senton, kiel senfine ŝprucanta akvo eniras en la sekegan kamparon estis la senerare kantita «*Oh quin bon eco*» (Lassus) kiun alifoje oni devis kanti.

Fine oni kantis *La Esperon* kaj ni ĉiu starante kaj solene akompanis la kantadon de l'Orfeo.

Resume: multe da entuziasmo, da arto, kaj la beleco de la fraŭlinoj de l'«Orfeo Tarragoni» superis ĉion.

BALO

Elirinte de la koncerto la kongresanoj sin direktis al «Teatro Principal» kie la esperantistoj tarragonanoj komplezis ilin per balo. La teatro estis plena de belaj kaj ĉarmaj fraŭlinoj kiuj vere allogis la ĉeestantojn. Dum la dancado oni dancis «La Rondon» kaj ĉiuj estis tre kontentigitaj de tiu agrabla festo kiu finiĝis la unuajn horojn matene.

FINO

Jen karaj kunfederacianoj, ĉion kio okazis en Tarragona; ni klopodis por doni al vi iomete da ideo pri nia ĝojo en la kunsidoj, pri la sukceso en niaj festoj, pri la entuziasmo de la esperantistoj, kaj de la neesperantistoj kiuj sin sentis tute allogitaj de ni, kaj ankaŭ, por ke ĉiuj kiuj parolis malbone pri nia organizaĵo vidu, ke ni ne estas tiel kiel ili pensis, kaj ke, se virina plumo skribis por ni *Maro estas gutaro* ĉiuj ni, Katalunaj esperantistoj, estas devigitaj ke tiu devizo estu realaĵo en niaj vicoj.

Amikoj! Kamaradoj! Vivu nia III^a en Vic!!!



KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ

LAŭ la peto de Dro. Zamenhof, tiu ĉi propono estis prezentita al la anoj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kaj principe aprobita de ili. Sekve, oni preparos elektadon de delegitoj, laŭ la maniero montrita de la projekto, kaj tiuj delegitoj povos, kredeble, diskuti kaj voĉdoni, en la Sepa Kongreso, pri la tuta afero.

Propono de Dro. Zamenhof pri la organizo de niaj Kongresoj

Internacia esperantista kongreso estas antaŭ ĉio festo de la esperantismo kaj propaganda manifestado. Sed krom tio ĝi havas (aŭ almenaŭ devus havi) ankoraŭ alian tre gravan rolon: diskuti kaj decidi pri tiuj demandoj, kiuj koncernas nian tutan aferon kaj ne povas esti solvataj de apartaj personoj, societoj aŭ institucioj esperantistaj.

Ĉiu esperantisto estas homo libera, kaj neniu havas la *devon* partopreni en ia komuna esperantista entrepreno; sed la plimulto de la esperantistoj havas la *deziron* tion fari. Ĉar ili konscias tre bone, ke Esperanto prosperos nur tiam, kiam ni laboros kune; tial apartaj personoj kuniĝas en grupojn kaj societojn, kaj la grupoj kaj societoj devas interkomunikiĝi, por preparoli kaj aranĝi entreprenojn komunajn. Tiel longe, kiel ni tion ni havos, ni ĉiam estos tute senfortaj, ĉar ĉiufoje, kiam aperos la neceso fari ian laboron komunan, troviĝos neniam plenumantoj; ĉiu aparta persono aŭ societo diros: «mi estas tro malforta aŭ ne sufiĉe aŭtoritata», aŭ: «mi ne volas labori sola por la tuta esperantistaro, ĉar eble oni povus rekompenci min nur per atakado aŭ nekomprene de miaj bonaj intencoj». Se ni ne volas esti tute senfortaj, la esperantistaj grupoj kaj societoj devas en orda maniero, per rajtigitaj delegitoj, periode preparoli kaj aranĝi ĉiujn necesajn komunajn entreprenojn. La plej bonan rimedon por tio prezentas niaj internaciaj kongresoj.

Ĉar ĉiu esperantisto estas homo libera, neniu havas ankaŭ la devon alkonformigi sin al la volo kaj opinio de ĉiuj aliaj esperantistoj (se li nur ne ŝanĝas la lingvon laŭ sia bontrovo kaj ne perdas per tio la rajton sin nomi esperantisto), sed la plimulto de la esperantistoj havas la *deziron* alkonformigi sin al la volo kaj opinio de ĉiuj aliaj, ĉar ili konscias tre bone, ke nia afero postulas antaŭ ĉio plenan unuecon kaj Esperanto progresos nur tiam, kiam siajn pro-

prajn kapricojn, dezirojn aŭ opiniojn ĉiu esperantisto submetos al la deziro kaj opinio de la plimulto. Tial estas necese, ke pri ĉiu aperanta demando ni havu la eblon scii la veran opinion de la plimulto. Tiel longe, kiel ni tion ne havos, al ni ĉiam minacos anarĥio, ĉiam troviĝos personoj, kiuj diros, ke nur ilia opinio estas la opinio de la plimulto kaj ke ĉia alia opinio estas nur maljusta altrudo aŭ provo de regado. Se ni deziras, ke la Esperantistoj laboru en plena unueco, ni devas, de tempo al tempo, en orda maniero, ankaŭ per rajtigataj delegitoj, esplori kaj publike klarigi pri diversaj aperantaj demandoj la deziron kaj opinion de la plimulto, kaj por tio ankaŭ la plej bonan rimedon prezentas niaj internaciaj kongresoj.

Bedaŭrinde ĝis nun niaj kongresoj ne povis plenumi sian agadon rolon, ĉar ili ne estis organizitaj kaj ne havis la eblon aranĝi aŭtoritatan voĉdonadon. Ni povis decidi nur pri demandoj plej malgravaj, kiujn oni povis solvi per aklamo; pri ĉio pli grava, pri kio la opinioj ne estis egalaj, ni nenion povis decidi, ĉar niaj decidoj, faritaj ne de orde elektitaj delegitoj, havus nenian valoron en la okuloj de la Esperantistoj.

Por meti finon al tiu stato kaj doni al niaj kongresoj la eblon labori kun klaraj rezultatoj, mi proponas, ke oni enportu la malsupre donitan aldonon en la regularon de niaj kongresoj.

Ĉar ni ne havas ankoraŭ ian aŭtoritatan institucion, kiu povus pli rajte decidi pri mia propono, tial mi prezentas mian proponon al la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Se ĝi aprobas mian proponon, tiam mi petas, ke ĝi publikigu sian decidon kiel eble plej baldaŭ en la *Oficiala Gazeto*, por ke al la Antverpena Kongreso ĉiuj esperantistoj povu jam prepariĝi laŭ la nova ordo.

L.-L. ZAMENHOF

Aldono al la Regularo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto

1. — Ĉiu decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la komunaj Esperantistaj Institucioj *oficialaj*, tio estas por tiuj, kiuj estas kreitaj kaj subtenataj de la tuta Esperantistaro. Por la Esperantistoj *privataj* ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto.

2. — Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la kongresa Regu-

laro; sed rajton de voĉdonado havas nur la regule elektitaj delegitoj de Esperantistaj grupoj aŭ societoj.

3. — Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas alla Kongresa Komitato rajtigan leteron, kiun, en la nomo de la grupo aŭ societo, subskribis ĝia prezidanto kaj ne malpli ol 25 membroj.

4. — Grandaj grupoj aŭ societoj povas elekti po unu delegito por ĉiuj 25 membroj majgrandaj grupoj aŭ izolitaj esperantistoj povas, por elekto de delegito, kuniĝi kun aliaj grupoj. Sed neniu havas la rajton doni sian subskribon pli ol por unu elekto.

5. — Ĉiu grupo povas elekti siajn delegitojn aŭ inter siaj propraj membroj, aŭ inter aliaj Esperantistoj kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupoj aŭ societoj, kiujn li reprezentas.

6. — La tagordon de la Kongreso fiksas la Prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu Komitato, kaj li publikigas ĝin du monatojn antaŭ la Kongreso en la *Oficiala Gazeto*, por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu la eblon esprimi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordon, ĝia aŭtoro havas la rajton disdoni ĝin dum la Kongreso al la delegitoj de la Kongreso, kaj se ne malpli ol 20 delegitoj subskribas ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

7. — Ĉi tiu projekto estas nur provizora. En la Antverpena Kongreso la rajtigitaj delegitoj diskutos kaj voĉdonos pri ĉiu paragrafo aparte kaj faros en la projekto ĉiujn ŝanĝojn, kiuj montriĝos utilaj.



LA VIRINO KAJ ESPERANTO

Katalune verkis, J. ALTURA PUJADA.

EN la hodiaŭa festo, festo de vivo, de amo, de beleco kaj de Esperanto, permesu al mi geamikoj paroli al vi mallonge pri la virino; al mi permesu transdoni al vi iun el miaj vizioj, kiu en momento de spiritaltigo, eliĝis sen ia nebuleto, sen ia nigra makulo; sed tute plena kaj penetrita de diafaneco kaj travidebleco.

Mia spirito, kiu eterne dubas, kiu senĉese luliĝas meze de la nigraj

kaj akraj ondoj de la elreviĝoj; kiu en ĝia cirkaŭo nur vidas fleksiĝi la senfortiĝantan melankolion, kiam ĝi aŭdas la vorton *Esperanto*, kiam ĝi aŭdas la vorton *virino*, kiam ĝi pensas pri la enkorpiĝo de tiuj-ĉi du sublimalaj vortoj, ĝi restas ravita, kredas al la morgaŭo kaj havas *Esperon*.

Al ni, kiuj volas la virinon liberigitan de la ĵugo sub kiu la homoj ŝin submetis; ni kiuj volas ŝin, ne kiel hibridan plantaĵon de nuancoj kaj formoj belaj, kvankam sen aromo nek vivo, sed plena da fruktodona semo; ni kiuj juĝas ŝin kiel la floron plej ĉarmegan de la Naturo; ni kiuj proklamis ŝin simbolo de beleco; ni kiuj ŝin alvokas en ĉiuj momentoj kaj je niaj preĝadoj al amo kaj al vivo; ni kiuj juĝas ŝin ne superebla kiel la giganta figuro de la patrino amo; ni volas ŝin por *Esperanto*.

¡Esperanto! Harmonia kaj varmoplena vorto, kiu devas vin allogi virinoj, ravaj sed delikataj estaĵoj.

¿Kiu el vi ne havas unu *Esperon*? ¿Kiu el vi elektitaj floroj ankoraŭ ne florintaj, ne esperas ĝojegan morgaŭon? Ĉiuj! Ĉiuj blankaj animoj kredas al tiu nekonita, sed atendita, feliĉa morgaŭo! Kaj kelkafoje, ankaŭ ni, la skeptikuloj, la amantoj de la soleco, ankaŭ kredas al ĝi. Mi volas ĝin kredi, sed antaŭe mi devas vin rigardi kaj eltrovi en vi, iom pli ol vian plastikan belecon, ol vian beltalion, ol vian ĝentilecon; mi devas eltrovi ankaŭ en vi, subtilan animon soifantan pri la tuta perfekteco por kiu vi estas destinitaj.

Esperanto, agado de paco kaj amo, liveras al vi preferan lokon en ĝiaj vicoj kaj al vi malfermas la noblecan vojon de tiu perfekteco, kiu grandigos kaj farigos de vi reĝinojn de la vivado. Sen vi, la tasko fratigi la homojn estos senutila; ĉar ĉiuj vi estas, kiuj scias teksu la katenojn per kiuj kapti la homon al la amo, metante en ĉiu girlando el blankaj rozoj, iridoj kaj ĵasmenoj, rondon da kisadoj por ke ĝi neniam rompiĝu.

Estas Esperanto ago de hieraŭ, de hodiaŭ, sed kiu atendas *morgaŭon* kaj, kiu pli bone ol vi povas al ĝi doni ĉi tiun morgaŭon, se vi estas la vera morgaŭo, se vi estas la tuta vivo?

Vi amu Esperanton kaj igu ĝin amata de ĉiuj; proprigu ĝin al vi kaj ĝi estos al ĉiuj; grandigu ĝin kaj vi grandigos, foriru el tiu *malnova vivado* kiu timigas vin kaj malgrandigas vian grandecon, por eniri en la novan vivon, plena de lumo, de amo kaj de beleco!

Vi, kiuj enhavas la tutan amon, prenu sur vin la bonan novaĵon — Esperanto — kaj signu ĝin per kiso varmega, pura, ĉasta, senmakula kaj la venko estos kun ĝi. Ĝi atendas momenton por edziĝi je vi, kaj dum ni atendas la ĉarman frukton, lasu al ni havi fidon en

ĝi, en vi, kaj lasu ke momente sentante nin viziemuloj, en nia penso, ni starigu sur la supraĵo de virga monto, altegan monumenton al Esperanto, kronitan per la superega beleco: la virino flagrante la verdan standardon kaj surportante meze de la ebura frunto, la unuigan laĉon; la markon de amo, simboligitan per nia kvinpinta verda stelo.

Tradukis: J. GARRIGA



LA AMIKECO

AL AMIKO PLEJ KARA F. SURROCA

EN la unuaj tempoj de la Homaro, antaŭ multaj centjaroj-okazis ke fraŭlineto blonda kiel la orkoloraj spikoj de la greno, de okuloj blukoloraj kiel la ĉielarko, blanka kiel la ŝaŭmo de kristalakvo, plendis maldolĉe sidinte sur la humilaj herbetoj, dum falis de siaj okuloj, belegaj perloj, kiujn la nevidebla Anĝelo de la Doloro rikoltis silente... Ĉe tio pasis preter ŝi, alia fraŭlino, ankaŭ juna kaj bela, kiu portis presitajn en siaj okuloj kaj en tuta sia estaĵo la klarajn signojn de la gajeco.

Ambaŭ estis reciproke nekonintaj sin, sed la lasta aŭdante la doloresprimon de tiu, kiu ploris tiel senkonsole, haltigis sian malpezan kaj ĉarman paŝon, kaj per dolĉa voĉo, diris al ŝi kelkajn vortojn. Poste ŝi sidiĝis flanke kaj komencis interparoladon ameman, karesan; sen alia aŭdantaro ol la birdoj, kiuj haltigis siajn kantaĵojn por aŭdi ĝin, kaj ol la humilaj bestetoj, kiuj lasis siajn aferojn ankaŭ por ĝin aŭskulti. La interparola amuziĝo daŭris dolĉe, kaj mallaŭte kiel virgulinekgemo. Oni aŭdis nur delikatan brueton de kisoj. Fine, leviĝis unu post la alia, kaj reciproke cirkaŭprenante sian talion foriris malrapide ĉiam parolante, parolante dolĉege, milde...

Interne, la gajulino estis ankaŭ pli gaja, sed oni vidis sur sia vizaĝo vualon de malgajeco. Ankaŭ la malgajulino estis sufiĉe dolora, sed la perloj en siaj okuloj jam ne estis senesperaj larmoj, ĉar ili estis kiel la gutetoj falantaj de la arboj, kiam post pluvo, la akvo

glitas trankvile, dum la suno brilas en la ĉielo, denove blua, denove hela...

Tiun tagon, naskiĝis la amikeco, la dolĉa amikeco : tiu ĉi sento neesprimebla, tiu ĉi ligilo nevidebla kiu uniigas la sentemojn de frataj animoj. Per tiu inklino, per tiu simpatio, ni ploras kune kun la ploranto, kaj ankaŭ ĝojas kune kun la ridanto, kaj ĝi donas al ni parolojn por dolĉigi la dolorojn de la suferantoj, talenton por montri la vojon al la erarinto, abnegacion por pardoni al kiu nin ofendas.

Ho sankta! ho dolĉa amikeco! Benon al ĝi!

JOSEFO CASALS DURÁN



ALILANDA MOVADO

AUSTRALIA

Melbourne. — S'ha fundat en aquesta població una societat que compta actualment amb un centenar de socis, els quals, junt amb els del grup «Majo», se reuneixen setmanalment en una gran sala situada en el centre de la població i llogada a l'efecte. Sembla que s' disposen a emprendre una ferma campanya per tot el país.

EGIPTE

Cairo. — S'acaba de fundar l'«Egipta Esperanta Asocio», la qual, junt amb el Sr. Jacques Guéron, mestre del col·legi «Alliance Israelita», autor dels llibres turc-esperanto, estan portant a cap l'obra de esperantitzar tots els pobles de llengua turca.

AUSTRIA

Lwów (Galitzia). — Quasi es segur que 'l VIII^e Congrès Internacional, en 1912, tindrà lloc a la població de Krakov, motiu pel qual els esperantistes d'aquells països s'han posat a treballar de ferm, avent començat ja a organitzar-se seriosament.

Una de les primeres manifestacions que portaran a cap es la organització d'una gran Exposició Esperantista, an el qual fi demanen l'ajuda de totes les entitats i de tots els particulars que lluiten per a la nostra idea.

ITALIA

Genova. — D'uns mesos an aquesta part la propaganda s'ha intensificat de tal manera, que 'l Congrés que acaba de celebrar-se en aquesta ciutat ha sigut un exit complet per a la nostra llengua.

L'edició que s'ha fet en llengua italiana, del *Follet Roig*, arriba a 350,000 exemplars; quantitat més expressiva, per ella sola, que tot allò que nosaltres poguessim dir.

POLONIA

Kielce. — A l'escola de dònnes d'aquesta població, hi dóna un curs d'Esperanto 'l metge militar Dr. Martí Steckiewicz.

Aquest senyor acaba de realitzar un viatge per Espanya i França, durant el qual ha donat conferències públiques en Esperanto a València i a París.

ESTATS UNITS

Després del VI.^e Congrés Internacional, que tingué lloc, l'any passat, a Washington, s'ha escampat de tal manera per tot el país l'Esperanto, que, com aquell qui diu a diari, estan fundant-s'hi societats per a la seva propagació.

Ultimament s'hi han fundat les d'Austin, Raleigh, Lancaster, Decorah i Chicago.

RUSSIA

Tomsk (Siberia). — A la ciutat d'Omsk ha tingut lloc una Exposició d'Indústria i Comerç, en la qual, a petició dels esperantistes de la Sibèria occidental, va instal·lar-se una secció esperantista, on se venien llibres, follets, insignies, etc., etc.

Moscou. — Durant les passades festes de Pasqua havia de tenir lloc la celebració del Congrés Esperantista Rus; però no quedant prou temps material per a la seva organització, s'ha acordat ajornar-lo per a les mateixes festes de 1912.

Sant Petersburg. — El 13 d'Abril la «Ruslanda Ligo Esperantista» celebrà la seva reunió anyal, i, segons la relació del president, Sr. Postuikov, compta actualment amb 30 societats aderides, escampades per diferents endrets del país.

BELGICA

Anvers. — S'ha publicat ja 'l programa provisional del VII.^e Congrés Internacional, el qual es com segueix:

Divendres 18 d'Agost. — Obertura de les oficines per als congressistes.

Dissabte 19. Obertura de l'Exposició. Recepció del Dr. Zamenhof a l'Ajuntament. Concert per la «Vagabonda Kluvo».

Diumenge 20. Festes religioses per a catòlics i anglicans. Manifestació dels congressistes. Concert en el Jardí Zoològic. Representació teatral de *Devo de Reĝo, Por trakuvilaj personoj* i *La Revuo de la Sepa*.

Dilluns 21. Obertura oficial del Congrés. Audició de cants regionals.

Dimars 22. Representació de *Kaatje*.

Dimecres 23. Segona representació de *Kaatje*. Recepció dels metges esperantistes en el «Cercle Médical».

Dijous 24. Repartició de premis del Concurs Literari. Concert en el Jardí Zoològic i recepcions particulars.

Divendres 25. Gran Ball internacional.

Dissabte 26. Tancament del Congrés i Gran banquet.

Diumenge 27. Festes religioses. Maniobres de la Creu Roja i Concert en el Jardí Zoològic.

Segons el número de Juny de *Belga Esperantisto*, els congressistes alcançen ja la xifra de 888.



OFICIALA PARTO

Amb motiu de la mort del nostre director i amic caríssim, en Domeriec Serdà Simó, s'han rebut una infinitat de cartes i postals de sentit condol; i, en l'impossibilitat de contestar-les totes d'una a una, vagin aquestes ratlles com a mercès i agraïment per les mostres de simpatia rebudes envers el finat.

Com auran pogut veure 'ls nostres llegidors, el nou Comitè pera 1911-12 ha quedat compost dels Srs. Dr. Bremon, *president*; Josep Planas, *presbitere, viç-president*; Estanislau Pellicer, *secretari*; Joan Piferrer, *caixer-administrador*; i Josep Palmarola, *vocal*.

Dits senyors donen les més corals mercès a tots els que tingueren a bé nombrar-los, confiant que la llur bona voluntat els deixarà sortir bé de les tasques que 'ls han sigut confiades.

Aquesta Administració prega a tots els senyors federats que així que tinguin coneixement de la sortida del K. E., si no l'han rebut, facin el favor de reclamar-lo a les respectives administracions de correus, puix repetidament

vénen queixes de no arribar a lloc exemplars que l'Administració té la seguretats d'haver enviat.

En el cas que algú deixi de rebre-l, remeti-s una postal a l'Administració de K. E. fent la reclamació; i així, sabent qui són els que no l'han rebut, podrem fer les oportunes reclamacions a Correus.

Pesant sobre l'Administració un munt de treball bastant feixuc, se prega a tots els senyors que creguin convenient dirigir-s'hi per a alguns assumptes, que, si no es cosa d'urgència, tinguin la bondat d'esperar les respostes que mensualment aniran sortint a la secció de *Korespondado* de K. E.; puix es una grossa feina l'haver de contestar nn per un tots els assumptes que fan referencia a Administració i Direcció de la Federació i son orgue.

Tots els senyors que desitgin adquirir exemplars d'aquest número, quedaran complaguts tot seguit enviant a l'Administració 50 centims en sagells de correu per cada exemplar que demanin.

La nova Direcció de K. E. prega a tots els senyors delegats i secretaris de grups que abans del 20 de cada mes tinguin cura d'enviar la ressenya del moviment esperantista de llur localitat, a fi de poder organitzar bé la secció d'*Enlanda Movaĉo*, puix es d'imprescindible conveniència que dita secció surti lo més completa possible.



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Ostlorn, vilaĝaj skizoj de S. Ulfers, el holanda lingvo tradukis M. J. Wessel. Prezo 1'65 sm. ĉe la firmo D. Van Lijn & Zoon Rotterdam.

Vere estas libro kiu ornamas la esperantan literaturon, ne nur pro la materiala vidpunkto, ĉar la libro estas eldonita luksege.

Tra la legado de la dek popolrakontoj enhavitaj en ĝi, ni vidas ke la aŭtoro realigas autaaŭ niaj okuloj la naturon, la homojn, la bestojn, tre maj-

tre, kaj ni dankas la aŭtoron por la horoj ĝuitaj dum la legado, legado kiun ni rekomendas al ĉiuj veraj literaturamantoj.

Suferado de Verter, de Gøthe, unua libro, unua parto; ricevbla per Eldonejo Esperanto, Aŭgustenstr. 17 y pr. Leipzig. Germanujo. Prezo o'10 sm.

Ankaŭ ni esperantistoj estas ĝojaj por legi tiun kortuŝantan rakonton tre bone esperantigitan de nekonata esperantisto, fakto kiun ni bedaŭras, ĉar ni ĉiam estas pretaj por laŭdi se estas laŭdinda la afero, kaj agi kontraŭe se la afero estas kritikebla laŭ la bona senco de la vorto kaj nun ni ne scias al kiu ŝuldas la laŭdojn.

Ondino, de Frideriko Barono de la Motte Fouqué el la germana originalo tradukis K. Myslik. Prezo o'50 sm.

Dankojn Pastro Myslik por via traduko de la ĉarma rakonto «Ondino» tiu rava juvelo en la trezoro de la germana literaturo.

Aline, svisa rakonto de C. F. Ramuz, tradukita de Sro. René de Saussure. Prezo 1 sm. ĉe Universala Esperantia Librejo. Genevo.

Sro. de Saussure faris belan tradukon de tiu svisa rakonto, kaj pruvas la literaturbonguston de la tradukinto elektante por konigi al esperantistaro tiun belan verkon, kiun kiam oni ekkomencas legi, ĝi allogas ĝis la fino, pro la flueco de la dialogo kaj ankaŭ pro la beleco de la afero.

Kongresa Parolado, de Dro. Zamenhof en Washington. W^o 1^a de la o'10 sm. Biblioteko Esperantista. Esperanto Propaganda Instituto. Leipzig.

Tre bone konata tiu majstrapeco, ni nur devas aldoni ke ĝi nun estas bele prezentita per eleganta bruŝureto.

Libro de kantoj, de Heinrich Heine, N^o 3^a de la Biblioteko Esperantista. o'10 sm:

Ni malfermas tiun malgrandan broŝuron, kaj ekkomencas legi «Junecaj Suferoj» kaj ĝis «La Reveno» — kiu estas la lasta kanto el la libro — ni traviras la ĝojojn kaj dolorojn kiujn la fama germana poeto lasis en sia poemaro.

Tre bele prezentita kiel la antaŭa, ĝi estas rekomendinda al ĉiuj kiuj ne konas la belajn poemojn de Heine.

Esperantista Kantaro, 17 liedoj originalaj aŭ esperantigitaj, aranĝita de Karl Jost. Prezo : 0'40 sm. ĉe Universalo Esperantia Librejo, Geneve.

Tiu dua eldono estas pli bone aranĝita ol la unua, ĉar ne nur la preseraroj estas korektitaj, sed ankaŭ la muziko estas nun pli korekta.

Saluto al Belgujo, poezio de H. Menalda, kaj muziko de F. de Mênil. Eldonejo «Espero» Hago.

Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto, por Esperantaj Ekzamenoj de R. de Ladevéze, Friedrich Ader, Esperanto-Verlag, Dresden. Prezo ne montrita.

Bonega libro por niaj esperantaj ekzamenoj, ĉar ni opinias kiel la aŭtoro, ke la esperantistoj ne nur devas koni la lingvon profunde, sed ankaŭ estas necese koni niajn organizaĵojn historion de la lingvo, la ideon de lingvo internacia, nian gazeton, Instituciojn, k. t. p., k. t. p.

Nenia libro pli taŭgonta ol tiu por solvi la problemon, kiu sin prezentas al esperantisto deziranta koni la ĉefajn vidpunktojn de nia movado, ĉar li estas devigata tralegi, librojn, ĵurnalojn, broŝurojn, kaj pasigi horojn legante. Do, tiu problemo estas solvita de Sro. R. de Ladevéze, tre lerte, ĉar post la legado de la 80 paĝoj, sen ia dubo la leganto konos sufiĉe niajn entreprenojn kaj la disvastigon de nia lingvo.

Internacia Higiena Ekspozicio. Dresden, Majo-Oktobro. 1911^a.

Deskriptiva broŝuro de tiu grava ekspozicio, kiu nun havas lokon en Dresden.

Ravena, gvidlibro de tiu urbo, por A. Tellini. Tiu broŝuro estis eldonita por ĝin donaci al la membroj de la IV Internacia Kongreso de Filozofio. (Bologna, 6-11 de Aprilo 1911^a).

Lübeck, gvidlibreto tra la Libera kaj Hanso-urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, tradukita de la Lubeka Esperanto Societo kaj eldonita de la Unuiĝo por fremduloj. Prezo : 0'200 sm.

Gridfolio tra Dresden, eldonita de la tiea gastotablo sub la aŭspicoj de U. E. A.

Vichy Gvidlibreto, publikigita sub la aŭspicoj de la Fama Kompanio de «Vichy-Etat».